# TELOPEO

La Oficiala Gazeto de la Esperanta Federacio de Novsudkimrio

Telopeo Volumo 57 Numero 04
sabate je la deka de julio 2021
Esperanto House 143 Lawson Street REDFERN NSW 2016 AUSTRALIA
Redaktoro: Maria TERANO, Provleganto: Kaja MORANTE

---

## Enhavo

**Telopeo** **1**

1 Jarkunveno 2

2 Vakciniĝu! 4

3 Ĉirkaŭ la Mondo kun Esperanto 5

4 Samaĝuloj 6

5 Vivsekretoj: 8 paŝoj por plibonigi vin (Fokuso sur la procezo kaj ne la Rezulto) 7

5.1 Enkonduko 7

5.2 Konkludo 8

**EFNSK** **9**

# Jarkunveno

*Nicole ELSE, sekretario de EFNSK*

La Jarkunveno de EFNSK okazos **11:00 dimanĉe je la dek-dua de septembro 2021 (2021-09-12)**. Ĝi okazos **virtuale** per la programo Zoom.

https://zoom.us/j/9177952650?pwd=Wkh5QU9rakhnUnF2WEVSWDI2ZnF6dz09
Kunveno ID: `917 795 2650`
Kodo: `700274`

La estraro demisios kaj la postenoj estos atribuitaj dum la jarkunveno.

Ĉiuj kandidatoj, inkluzive de tiuj, kiuj jam estas estraranoj, devas esti kandidatigataj kaj subtenataj. La kandidatoj devas ankaŭ konsenti, per retpoŝto, ke li aŭ ŝi akceptos la postenon. La sendanton de la unua kandidatigo oni konsideros kiel la proponanton, la duan kiel la subtenanton. Ambaŭ devas esti financaj membroj de EFNSK.

Laŭ la nova statuto de la Federacio (legebla ĉe esperantohouse.org.au/eo/about-us), se iu estis estrarano seninterrompe dum naŭ jaroj aŭ pli, speciala rezolucio devas okazi, por permesi lin aŭ ŝin esti kandidatigata (kaj elektota) dum pluaj periodoj. Tial, ni voĉdonos pri la jena rezolucio (en la angla) dum la jarkunveno:

`That Nicole Else, Alan Turvey and Dmitry Lushnikov be permitted to be re-elected as directors.`

Membro povas esti kandidatigata por unu aŭ pli el la jenaj postenoj:

- Prezidanto
- Vicprezidanto
- Ĝenerala Estrarano

Sendu kandidatigojn rete al: nsw@esperanto.org.au Aŭ poŝte al:

```
EFNSK
Esperanto House
143 Lawson St
REDFERN NSW 2016
AUSTRALIA
```

Ni esperas, ke vi povos ĉeesti la jarkunvenon, kaj bonvolu sciigi nin, ĉu vi deziras esti kandidatigata por la estraro aŭ povas iel helpi la Federacion. Se vi NE povos ĉeesti sed tamen ŝatus voĉdoni, vi povas peti iun voĉdoni nome de vi (kiel via mandatulo). Bonvolu kontakti nin se vi ŝatus pli da informoj.

Ni ankaŭ feliĉus aŭdi viajn komentojn, ideojn, ktp, por la venonta jaro.

# Vakciniĝu!

*Maria TERANO, membro de EFNSK*

Sidnejo denove enŝlosiĝis, kaj verŝajne la situacio daŭros ĝis la fino de la jaro. Ni individue ne povas ŝanĝi la kvanton de tagaj novaj infektitoj. Tamen ni povas regi nian propran korpon.

Al ĉiuj legantoj: Restu sekure! Surmetu maskon! Kaj…vakciniĝu!

Nun ĉiuj plenkreskuloj rajtas ricevi vakcinon. La risko de la vakcinoj malgrandas, kaj la ŝanco de infektiĝo estas granda nun.

Estas multe da misinformo pri la viruso kaj vakcinoj. Ĉiuj markoj de la vakcinoj uzataj en Aŭstralio sekuras, kaj efikas. Alternativaj kuracoj ne efikas, kaj ne sekuras. Tial mi petas al ĉiuj, vakciniĝu, kaj vakcinu vian familion! Protektu nian komunumon!

# Ĉirkaŭ la Mondo kun Esperanto

*Dmitry LUŜNIKOV, direktoro de EFNSK*

## Parto 2. Istanbulo





La ĉefurbo de Turkio havas ne nur longtempan historion, belegajn konstruaĵojn kaj bongustan manĝaĵon. En Istanbulo vi povas trovi interesajn homojn kiuj parolas esperante. Mi trovis du: Fatma kaj Alp. Ni kune promenis, manĝis tradician turkan vespermanĝon kaj vizitis galeriojn de moderna arto. Kiel kutime kun Esperantistoj mi havis tre interesan tempon. Se vi planas viziti Istanbulon trovu Fatma EROĞLAN en Fejsbuko kaj nepre konatiĝu kun ŝi.

Bonan vojaĝon!

# Samaĝuloj

*Nicole ELSE, sekretario de EFNSK. Tradukita el la angla*

Ĉu foje okazas, ke vi vidas samaĝulon kaj pensas, ke li aŭ ŝi aspektas multe pli aĝa ol vi?

Mia nomo estas Sofia kaj mi devis iri al dentisto, do mi sidis en la atendejo. Estis nova dentisto, kiun mi antaŭe ne vidis. Sur la muro estis lia dentista diplomo, kiu montris lian nomon. Mi jam aŭdis tiun nomon. Kie? Ha jes, estis iu kun tiu nomo en mia klaso en mezlernejo. Mi tiam memoris, ke li estis alta, svelta belulo kun nigraj haroj. Fakte li estis tre alloga kaj mi eĉ tiam enamiĝis al li.

Nun estas mia vico. La dentisto alvenas, sed ne temas pri belulo kun nigraj haroj, sed iom dika duonkalva viro kun grizaj haroj. Supozeble tamen ne temas pri mia samklasano. Tiu viro ja estas tro maljuna por esti mia samklasano.

Tamen li ja iomete similis al tiu junulo, do post kiam li ekzamenis miajn dentojn, mi demandis al li, ĉu li iris al la Vangoga mezlernejo. « Jes, tio estis mia lernejo », diris la dentisto. « En kiu jaro vi finis la lernadon tie? » « En 1981. Kial vi demandas pri tio? » Mi do klarigas « Vi estis en mia klaso ». Tiam tiu malbela, kaduka aĉulo kun vizaĝo plena de sulketoj demandis: « Kiun fakon vi instruis? »

# Vivsekretoj: 8 paŝoj por plibonigi vin (Fokuso sur la procezo kaj ne la Rezulto)

*Aatral Arasu, membro de EFNSK, lichess.org @aa-noob*

## 5.1 Enkonduko

Lastatempe mi vidis Jutuban-filmeton, kiu resonancis de mia sperto pri plibonigo de mia memo. En ĉi tiu artikolo, mi ŝatus dividi kun vi la procezon de 8 paŝoj, kiuj helpos vin identigi kaj pasigi pli da tempo pri la agadoj, kiujn VI ĝuas en VIA vivo.

1 **Strategio Seinfeld:**
Faru ĝin ĉiutage kaj trairu la liberajn tagojn en via jara kalendaro, kie vi faris ĝin. Malfaciligu nesanajn kutimojn pli malfacile trakteblajn per obstakloj.

2 **Media Projektado:**
Kreu aŭ iru al medio favora kaj helpema por vi travivi viajn kutimojn.

3 **La 2-minuta regulo:**
Komencu kutimon fokusante fari tion, kio estu farita dum la unuaj 2 minutoj (farante malgrandajn paŝojn). Instigo venas post ekiro, do faciligu la komencon kiel eble plej facile, ĉar la plej granda rezisto estas en la komenco. Instigo venas de laborado.

4 **Antaŭengaĝiĝo:**
Tuja volforto akirante per klaraj tempokadroj, kiujn oni ne povas ignori.

5 **Efektiviga Intenco:**
Skribu detalan engaĝiĝon enhavantan: kutimon, loko, tempo, daŭro.

6 **Kompromiti vin al viaj interesoj (Keystone-Kutimoj):**
Rutino / rito, kiun vi travivas en certa tempo (kiel ĉiu mateno), kiu preparas vin gajni la tagon kaj sekvajn tagojn per konstruado de impeto.

7 **Kutimo-formado:**
   A **Memorigilo:** Signalvorto / ellasilo, kiu komencas la konduton.
   B **Rutino:** Agi laŭ kutimon mem.
   C **Rekompenco:** Avantaĝoj de kutimo (veki / ligi la novan konduton al jam ekzistanta).

8 **Revizii viajn interesojn: (25-5 regulo):**
Skribu rangan 25-prioritatan liston de tio, kion vi volas atingi hodiaŭ / en ĉi tiu monato / jaro / en via kariero. Forĵetu n.rojn 6-25 kaj fokusu nur sur la 5 plej bonaj.

## 5.2 Konkludo

Sekvu la supre 8 paŝojn dum 21 tagoj. Konservu vin dividante tion, kion vi volas atingi (mia retpoŝta identigilo estas aatrala@gmail.com) komence kaj mezuru vian progreson post la fino de 21 tagoj. Informu min, ĉu ĉi tio helpis vin! 😀

Esperanto House
143 Lawson Street
REDFERN NSW 2016
AUSTRALIA

**EFNSK**
La estrarkunsido per reto
La unua dimanĉo de la monata je 11:00
Kontaktu per nsw@esperanto.org.au

**Sidneja Esperanto-Klubo**
Ĉe la esperanto-domo 143 Lawson St REDFERN NSW 2016
Ĉiun sabaton je 18:00
Kontaktu per 02 9319 4775

**Manlia Esperanto-Klubo**
Ĉe Whitewater Restaurant 36 S Steyne MANLY 2095
La unuaj kaj triaj sabatoj de la monato je 10:30
Kontaktu Roger SPRINGER per 02 9976 6320 aŭ manly@esperanto.org.au

**Esperanto-Kluboj de la Centra Marbordo kaj Novkastelo**
Ĉe Wyong Milk Factory Cafe 141 Alison Rd WYONG NSW 2259
La tria dimanĉo de la monato je 12:00
Kontaktu Joanne CHO per 0413 087 340 aŭ centralcoast@esperanto.org.au

**Esperanto-Klaso de Cooma**
Ĉe Snowy Mountains U3A Shop 8 (supre) Centennial Plaza
81-97 Commissioner St COOMA NSW 2630
Ĉiun ĵaŭdon je 15:00
Kontaktu Penny VOS per 0429 170 739 aŭ penivos@yahoo.com

**Esperanta Kafo-Klubo de Kanbero**
Ĉe The Pancake Parlour 122 Alinga St CANBERRA ACT 2601
Ĉiun jaŭdon je 17:00
Kontaktu Huigh MALCOLM per 02 6288 4334 aŭ canberra@esperanto.org.au

www.esperantohouse.org.au
www.instagram.com/esperanto_nsw
www.facebook.com/EsperantoNSW
www.meetup.com/esperanto-in-Sydney

| | |
|---|---|
| **Prezidanto** | Andrew SPANNENBERG |
| **Vicprezidanto** | Dmitry LUŜNIKOV |
| **Sekretario** | Nicole ELSE |
| **Kasisto** | Jonathan COOPER |
| **Estraranoj** | Alan TURVEY, Adam LEVY |